Numero nula
Majo 2005

# Historia Revuo

sendependa magazino pri la historio de Esperanto


**Prov-numero**:
La plano eldoni revuon pri la historio de Esperanto

**Rubrikoj**:
Pri la unuopaj eroj kiuj estonte aperu en HR

**Ankaŭ kun vi**:
Kiel oni povos kunlabori kaj kial estas avantaĝe publikigi en HR

## «Nova revuo por la malnovo»

Vi ne eldonu la de vi planitan gazeton, admonas malnova esperantista dekalogo. Ziko M. Sikosek argumentas kial tamen estas tempo por nova revuo.



Numero nula
Majo 2005

# Historia Revuo

sendependa magazino pri la historio de Esperanto
aperas nur rete

redaktoro: Ziko M. Sikosek, Varsseveld / Nederlando
m@sikosek.de

**Manuskriptojn** oni akceptas nur en elektronika formo. Bonvolu konktakti la redaktoron antaŭ ol sendi.
Tekstoj havu la supersignojn en la x-sistemo. Atentigu pri ceteraj specialaj signoj. Bildoj – malmultaj, bone elektitaj – estu apartaj.

**Artikolo**

3 Brita Asocio kontraŭ Edmond Privat
*de Ziko Marcus Sikosek*

**Kontribuo**

7 La projekto „Historia Revuo"

**Rubrikoj**

7 Recenzoj

7 Rondrigardo

8 Faka kroniko

8 La bildo

**Frontpaĝa bildo** (Detalo.) Esperanto-konferenco en la svisa urbeto Locarno, 1926. Kelkajn monatojn pli frue okazis samloke la fama konferenco de la eŭropaj politikistoj.

**Historia Revuo** ĉi-foje ankoraŭ nur prezentas sin. Sed vi jam ricevu impreson, kiel ĝi estonte povu aspekti. La komencon faru iom longaj artikoloj, poste eble mal-pli grandaj kontribuoj (nun sen ekzemplo), kaj poste la kutimaj rubrikoj. Se sufiĉos la eĥo kaj venos proponoj pri kunlaborado, en la fino de la jaro 2005 aŭ pli frue oni havos preta la unuan numeron. Legu pli pri la projekto sur paĝo 7.

Sincere
Ziko M. Sikosek

Ziko M. Sikosek:

# Brita Asocio kontraŭ Edmond Privat

Neŭtraleco, paco, justeco, objektiveco... kiu kredas ke tiuj temoj estas pridiskutataj nur en la nuntempo, tiu partoprenu ekskurson al pli frua jaro en la historio de la Esperanto-komunumo. Per dokumentoj trovitaj en Biblioteko Hector Hodler nun eblas sekvi konflikton kies dosiero estis titolita „BEA kontraŭ d-ro Privat".

En 1932, kiam *Esperanto* de UEA estis nomata kutime ankoraŭ gazeto kaj ne revuo, la leganto povis rimarki ke redaktoro Edmond Privat interesiĝis ne nur pri Esperanto. La eksa prezidanto de la Asocio, granda retorika talento, speciale interesiĝis pri sociaj demandoj, paco kaj milito, kaj pri la viktimoj de laŭ li nejusta politiko. Jam frue li atentigis pri la situacio de la poloj; en 1922 li varme pledis por UK en Germanio, kies popolo estis „tiom suferanta kaj pacience elportanta la ŝarĝon de sia sorto" (*Esperanto*, 1922, septembro, p. 158); dum lia gvidado de la gazeto (1920-1934) aperis aldonoj pri „indiĝenoj (kolorrasoj)" kaj la Internacia Labor-Organizo. La doktoro pri historio lobiis ĉe la Ligo de Nacioj kaj perlaboris siajn vojaĝojn per ĵurnalista laboro. En okcidenta Svislando li estas sufiĉe grava persono en la evoluo de politika ĵurnalismo, pro kio la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds instalis ĉambreton pri li.

## Vojaĝo politika

Se oni ne tro interesiĝis pri ekzotikaj landoj aŭ neesperantaj temoj, oni eble preterfoliumis la unu kaj duonan paĝojn grandan artikolon, kiun Privat nomis „Okcidento kaj Oriento. Impresoj el Hindujo" (*Esperanto*, 1932, majo, p. 78/79). Sed kiu fakte legis tiujn redaktorajn vojaĝimpresojn, tiu havis la okazon denove konatiĝi kun tre politika verkanto. Grandan parton Privat dediĉis al Gandhi, kaj ĉar la heroo de la popolo estis arestita, laŭ Privat do „necesis vojaĝi libere kaj propre sen akompano uzante nur sian juĝon kaj emon tute sendepende."

La „arianoj" havas la saman rason kiel la eŭropanoj kaj aspektas parencaj, kvankam en la nordo la haŭto estas pli hela ol en la sudo. Oni povis facile trovi interpretanton aŭ gvidanton kaj vagi kie ajn, „en plena sekureco", kaj eĉ virino trovas en Hindujo respekton „nekutiman en eŭropaj urbegoj", Privat opiniis. Lin tuŝis la malriĉeco en la urboj, sed: „En vilaĝoj estas eĉ pli mizere. Tie homoj tenas sian ventron per manoj pro malsato. La registaro dispruntis la teron al heredaj taks-kolektantoj. [...] La granda minaco al la vilaĝo estas la alkoholbutiko, monopola organizaĵo de la ŝtato por vendi sukon el palmoj."

Kiel kutime en politika ĵurnalismo, Privat ne skribas rekte sian politikan opinion. Tamen ĝi facile videblas en la elektitaj citaĵoj de hindoj. „Tiu popolo amema kaj tre sentema unuanime deziras liberecon por ŝanĝi la organizon. Pri tio ekzistas nek du opinioj, nek manko de opinio. [..] Ili plendas, ke ilian monon oni prenas por pagi fremdan armeon kaj altegajn salajrojn al fremdaj oficistoj, kiuj administras la landon en la intereso de fremda komerco, kaj ne por savi la popolon el mizero. [...] En bazaroj oni vendas la bildojn malgraŭ ĉiuj persekutoj: Gandhi en malliberejo, Gandhi kun pilgrima bastono, Gandhi kun la sanktula rondlumo

ĉirkaŭ la kapo, Gandhi kun la ŝpinilo, Gandhi gvidanta la ŝipon per la direktila rado 'Vero', k.t.p.”
Post la arestiĝo de Gandhi daŭre okazas rifuzoj de obeo, kaj Privat priskribas unu el ili. Laŭ li la Kongresanoj, do la anoj de la indiĝena, opozicia nacia organizaĵo, manifestaciis senperforte, svingis flagon kaj kriis „Saluton al Hindujo” aŭ „Vivu Mahatma Gandhi”. Tamen venis polico per aŭtoĉaroj kaj batis la homojn. „La Kongresanoj ne redonas batojn, sed krias ĉiam pli laŭte: 'Vivu Gandhi' ĝis ili falas vundite.”
La ideon ke nacio devas sange batali por libereco, Privat nomis afero de „tre malmultaj intelektuloj”, kaj eĉ ili estas fidelaj al la senperforteco de Gandhi, pro respekto al li kaj la decidoj de la Kongreso. Tiun sintenon Privat trovis „tro malofta” en la mondo kaj tial precipe raportinda. Kiel ceteran specialaĵon de la hindoj li prezentis la religian toleremon, la apudvivadon de diversaj kredoj. „Niaj eŭropaj gazetoj insistas pri disputoj, sed la vojaĝanton surprizas male la unueco.”
Edmond Privat ankoraŭ ne estis tute certa pri la interesiĝo kaj konsento de la legantoj, kaj li finis sian kontribuon per la propono estonte priskribi denove „la detalojn de moroj, pejzaĝoj, bestoj, kulturo kaj hindaj institucioj observitaj dum vojaĝo”, se la legantoj esprimos al la redakcio deziron pri tio.

## Reagoj el Britio

En la Arkivo de UEA (T02-010) troviĝas maldika dosiero kun la reagoj kaj korespondadoj kiujn evokis tiu artikolo. Oni devas kompreni ilin kun la scio, ke tiam en 1931-1934 estis disputoj foje tre akraj inter la „supernaciisma“ UEA kaj la „naciismaj“ naciaj societoj – pro konkurencado pri membroj kaj la demando, kiu rajtas paroli en la nomo de la movado kaj kiu pagas por tio.



M. C. Butler, EdE. 1934

La sekretario de Brita Esperantista Asocio, Montagu C. Butler, skribis en la nomo de la asocia komitato al UEA-prezidanto Eduard Stettler, la 7-an de junio 1932. La brita asocio „formale kaj forte protestas“, ĉar la artikolo de Privat estis „eldiraĵo tre tendenca de politika vidpunkto“, partia rilate al la aferoj de Hindio, kaj „esence direktata kontraŭ la brita administrado de tiu lando“. Privat „ege misuzis“ sian pozicion kiel redaktoro, sekve la brita asocio petis malpermesi al li „pluajn tendencaĵojn“ en la gazeto.
Jam tri semajnojn pli frue la brito A. W. Thomson skribis personan leteron al Privat, la 16-an de majo, kaj nomis la „malneŭtralan sintenon” de Privat „malservo” al la varbado en Britio. Estis supozoj en la publiko ke la esperantistoj havas rilaton al komunismo, kaj per tia agado tiu problemo povus pligrandiĝi. Eble la personaj opinioj de Privat estas sinceraj, sed li ne „oficiale trudu ilin al la esperantistaro“, ĉar ili „nepre ofendos“ la „homaman britan popolon“.
Sekvis la vidpunkto de Thomson pri Hindio. Ĝi ne estas „nacio”, kion skribis Privat, sed „sinintermurdema gentaro”, kaj nur la brita influo limigis anarĥion kaj malsategon. „La heroaj oferoj de generacioj da britaj juĝistoj, kuracistoj, inĝenieroj, instruistoj, administrantoj kaj misiistoj grade faris ioman civilizan impreson sur tiu kaleidoskopa amaso.” Sed Gandhi,

tiu „ĉefhipokritulo”, „malrapidigas progreson en Hindujo”, ĉar li volas ke la britoj „fordonu la polican kaskon [...].” Cetere Thomson rifuzas la kredigon, ke Britio starigis en Hindio drinkejan monopolon: „mensoga kalumnio”.

## La vidpunkto de UEA

Prezidanto Stettler respondis al la brita asocio la 13-an de junio, ke laŭstatute la redaktoro ĝuas en sia laboro la plej eblan liberecon. Privat, kiu havas multajn kvalitojn, subskribas ĉiam en sia propra nomo. „Se li publikigas similaĵojn al tio, kion oni jam legis en la taga gazetaro, tiam la revuo mankas intereson, kaj se li klopodas skribi laŭ sia vidpunkto, li kuras la riskon ektuŝi aŭ transpaŝi la limojn permesitajn. Certe vi scias, ke S-ro Privat interesiĝas el idealismo pri multaj liberigaj movadoj kaj seninterese defendas la partion kiu estas aŭ kiun li kredas esti la pli malforta. Laŭ lia konvinko estas eĉ unu el la taskoj de la Esperanta movado konatigi la sentojn kaj aspirojn de gentoj, kiuj aliloke trovas neniun aŭ nesufiĉan atenton.”


UEA-gvidantoj en 1931, de maldekstre: redaktoro Edmond Privat, estrarano Paul Blaise, direktoro Hans Jakob, prezidanto Eduard Stettler.

Stettler koncedis ke aliflanke „rezultas el la neŭtraleco de UEA ke tiaspecaj artikoloj nek estu ofendaj, nek per sia enhavu aŭ troa ripeto donu la impreson ke nia asocio estas solidara kun ili. UEA volas progresigi la movadon kaj resti en plej amikaj rilatoj kun ĉiuj naciaj societoj. Tial mi multe bedaŭras se en la aludita artikolo vi vidis ofendon kontraŭ la Brita nacio aŭ la administrado.” Tiun intencon Privat ne havis, kaj Stettler petis lin respondi.

Privat faris tion la 22-an de junio, ripetante la atentigon de la prezidanto pri la rajtoj de redaktoro, precipe post kiam oni jarkomence ŝanĝis la subtitolon de *Esperanto*. El la „oficiala organo” fariĝis „Internacia Revuo eldonata de UEA”, tiel ke oficialaj restas nur tiuj specialaj paĝoj en la gazeto. Laŭ Privat „kelkaj estraranoj” deziris ke la gazeto „fariĝu pli viva kaj libera”. Direktoro Jakob proponis eĉ „regulan analizon de la internaciaj politikaĵoj”.

Kaj sekve, oni petis lin, revenintan el Hindio, pri siaj impresoj. Sed li evitis doni sian propran juĝon, kiu al hindoj povis esti pli ofendaj ol al britoj, ĉar li persone preferus ke Hindio restu en la Brita Naciaro, kiel Aŭstralio aŭ Sudafriko. Li volis nur priskribi kion li vidis kaj bedaŭris ke „la nura cito de faktoj povis ofendi iun ajn”. Privat admiris la predikon de Gandhi kontraŭ malamo. Sen la kapablo superi naciajn antaŭ-juĝojn kaj sen kompreno pri aliaj nacioj, „nia esperantismo valoras nenion“. Kaj Privat volis nur forigi antaŭjuĝojn kontraŭ orienta popolo. Fine Privat faris minacon, kiam li proponis konsideri eksiĝon el la nuna posteno por povi pli libere kontribui kiel simpla kunlaboranto.

La 29-an de junio BEA respondis al Privat kaj Stettler. Post afablaj vortoj kaj la deklaro ne plukorespondi aŭ peti publikigon de la protesto por ne embarasi la mondan asocion aŭ la

redaktoron, Butler volis lasi „la aferon resti“. Tamen li ripetis la pravecon de BEA protesti kaj petis estonte rememori tiun vidpunkton.

### Kontraŭeto

Ambaŭ flankoj supozeble komprenis la reciprokajn minacojn, kaj la korespondado ĉesis. En la dosiero, almenaŭ. La konflikto pluekzistis, ne tiu pri la unuopa afero Hindio, sed pri la sinteno de esperantistoj al mondaj problemoj ĝenerale. Ĝi kulminis en la postaj jaroj, tamen Edmond Privat ne aliĝis al la „svisaj protestantoj“; aliflanke, iom surprize, tiu A. W. Thomson poste troviĝis en la komitato de la „ĝeneva“, „supernaciisma“ UEA.
La redaktoro de la gazeto metis lastan punkton pri la hinda problemo – en sia maniero. Kun la sama titolo kiel en la antaŭa numero, Privat revenis al la temo (*Esperanto*, 1932, junio-julio, p. 102). Per „Birdoj sur bovinoj” kaj aliaj impresoj priskribis la bestaron de Hindio, priskribante paradizon en kiu „inter si la bestoj reciproke helpas unu la alian”, kion oni povas kompreni kiel daŭrigon de la aserto ke la etnoj kaj religioj en Hindio pace kunvivadas. „En tiu lando de vegetaranoj la bestoj malpli timas la homojn. Regas ia konsento, eĉ amikeco senvorta.“

Pri la aŭtoro: La germano (Ziko) Marcus Sikosek studis historion kaj germanan filologion. Li naskiĝis en 1973 kaj esperantistiĝis en 1988. Interalie li redaktis la organon de Germana Esperanto-Asocio kaj laboris kiel bibliotekisto-arkivisto por Universala Esperanto-Asocio.

* * *

## Artikoloj en HR

Pri la artikoloj en HR la aŭtoroj konservas siajn kopirajtojn. Tial represo el HR estas permesata nur kun aprobo de la koncerna aŭtoro. Aliflanke, pri la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. HR insistas ke aŭtoro provu esti objektiva, kaj rezervas al si la rajton rifuzi manuskriptojn. Eventuale aperos komento sub artikolo, por establi certan ekvilibron. La nivelo de la kontribuo estu laŭeble sciencnivela, sed tamen verkita en lego-agrabla stilo. Oni rajtas uzi piednotojn. Aŭtoraj nomoj estas menciataj ankaŭ en la enhavtabelo.
La rubriko „Kontribuoj“ enhavos malpli longajn tekstojn kiuj povos esti pli leĝeraj.
Aŭtoroj, kiuj deziras publikigi en HR, bonvolu kontakti la redaktoron antaŭ ol sendi manuskripton. La redaktoro informos pri ĝenerala interesiĝo kaj teknikaj gvidlinioj.

* * *

Ziko Marcus Sikosek:

# La projekto „Historia Revuo“

En la Esperanto-komunumo ekzistas multe da interesiĝo pri historio, tamen ĝis nun ne troviĝas adekvata forumo por historiistoj kaj historiantoj. Oni konstatas ke multaj el ili eldonas maldikajn broŝurojn aŭ informas pri sia agado en iu landa aŭ loka Esperanto-gazeto. Pli taŭgaj estas internaciaj revuoj kiel *Esperanto* de UEA aŭ la eldonaĵoj de SAT, sed la sekvo estas ke historiemulo devas pene serĉi la artikolojn. Longaj artikoloj plurdekpaĝaj ĉiukaze ne havas ŝancon en „ordinara“ Esperanto-gazeto. Ofte io aperas – kaj poste malaperas – sur la persona retpaĝo de aŭtoro.
Tiu-cele mi proponas eldoni *Historian Revuon*, por longaj artikoloj, por kontribuoj kaj por diversaj rubrikoj kun la rilato al Esperanta historio. Por eviti kostojn kaj kroman laboron, HR aperu nur rete, en pdf-formato. Tiel oni havos serion da facile akireblaj, neŝanĝiĝantaj numeroj, el kiuj eblos ankaŭ science citi. La estontaj aper-ritmo kaj amplekso ankoraŭ ne estas fiksaj, sed verŝajne temos pri nur malmultaj numeroj dum unu jaro, eble du. Tio dependos ankaŭ de la eĥo en la esperantistaro.
La jena prov-numero – nomita „nula numero“ – provas doni impreson pri la eventuala aspekto de HR kaj invitas kontakti la redaktoron por demandoj, sugestoj kaj proponoj pri kunlaboro.

* * *

# Recenzoj

La eldonantoj (kaj recenzantoj) de koncernaj libroj trovas en HR perfektan podion kaj konsideru la aperigon de recenzo. Por eviti nenecesajn sendokostojn kaj la problemon, ke la HR-redaktoro eble ne (rapide) trovos recenzanton, la eldonanto prefere unue kontaktu la redaktoron. Bonvolu ne sendi libron al la redaktoro nedemandite. Estas ĉiuokaze senchave informi la redaktoron pri la publikigo de libro, por ke aperu almenaŭ mencio. Eventuale aparta kunlaboranto de HR troviĝos por kolekti tiujn informojn.
La leganto trovu iom longajn recenzojn, kiuj priskribas la libron kaj ricevu impreson, ĉu li trovas la libron aĉetinda.

* * *

# Rondrigardo

En tiu ĉi rubriko eblos raporti pri eventoj kun rilato al Esperanto-historio, kiel konferencoj, komenciĝoj de grandaj projektoj kaj simile. Estas loko cetere por eldonaĵoj kiuj ne ricevas recenzon, kaj por prezenti sian aktualan esplor-projekton.

* * *

# Faka kroniko

La kroniko konservos por la historia memoro gravajn okazojn en la fako Esperanto-historio: ŝanĝiĝoj rilate al biblioteko aŭ muzeo, la fako dum la UK (ekz. en Esperantologia Konferenco)... Sed la fina aspekto de tiu ĉi kaj aliaj eroj de HR ankoraŭ ne estas fiksita, la praktiko montros la bezonojn.

* * *

# La bildo

Tie ĉi eblos aperigi interesan historian bildon kaj interpreti ĝin. Eventuale oni havos similan rubrikon kun dokumento.

* * *